

Akademia decido pri pasivecaj adjektivoj

A. La Akademio de Esperanto konstatas,

1. ke en la Esperanta lingvouzo ekzistas kelkaj adjektivoj (ekzemple *korekta*, *komplika*, *fiksa*, *malferma* kaj *veka*), kiuj estas formitaj el verba vortobazo¹ kaj la adjektiviga finaĵo *-a*, kaj kies signifo (aŭ unu el kies signifoj) estas parenca al tiu de pasiva participo de la koncerna verbo;
2. ke ne regas konsento inter la parolantoj de Esperanto – eĉ ne inter spertaj parolantoj de Esperanto – pri la demando ĉu ĉi tiuj pasivecaj adjektivoj² estas ĝustaj aŭ eraraj, ĉu ili estas parto de bona lingvouzo aŭ evitindaj neregulaĵoj.

B. Esplorinte la problemon en sia tuteco el diversaj vidpunktoj, la Akademio aldone konstatas,

1. ke adjektivoj de la formo *V-a*, kie *V* estas verba vortobazo, ĝenerale havas la signifon *rilata al aŭ karakterizata de la ago V-i*;
2. ke ĉi tiu ĝenerala signifo povas plipreciziĝi laŭ la kunteksto kaj laŭ la signifo de la vortobazo *V*;
3. ke fojfoje ĉi tiu pliprecizigita signifo eĉ povas simili al la signifo de *V-ita*, *V-ata*, *V-ebla* aŭ *V-inda*, kiel ĉe *skriba* kaj *parola* en esprimoj kiel *skriba atesto* kaj *parola lingvo*;
4. ke la kontestataj pasivecaj adjektivoj kiel *korekta*, *komplika*, *fiksa*, *malferma* kaj *veka* ne estas klarigeblaj kiel laŭkuntekste aŭ laŭ la vortoba signifo pliprecizigitaj variaĵoj de tiu ĝenerala signifo;
5. ke ĉi tiu malkohereco de la kontestataj pasivecaj adjektivoj kun la kutima signifo de verbobazaj adjektivoj estas en la plej oftaj okazoj klarigebla surbaze de la ekzisto de similformaj nacilingvaj adjektivoj kun la kontestata pasiveca signifo;
6. ke la pasivecaj adjektivoj kontribuas al tio, ke homoj uzas klare malĝustajn formojn kiel *korektigi*, *komplikigi* kaj *vekigi* (en la sencoj de *korekti*, *kompliki* kaj *veki*), kiuj minacas la oficialan kaj kutiman bazan signifon de tiuj radikoj;
7. ke kelkaj el tiuj kontestataj pasivecaj adjektivoj (precipe *korekta*, *falsa*, *duba* kaj *komplika*) estas jam delonge forte enradikiĝintaj en la lingvouzo de spertaj parolantoj de Esperanto, tiel ke oni ne povas senprobleme stampi ilin kiel erarajn, sed prefere nomu ilin tradiciiĝintaj nekoheraĵoj;
8. ke ĉiuj ĉi konstatoj aplikiĝas egale al la koncernaj adverboj kiel *korekte*, *komplike* ktp (la ĝenerala signifo de adverbo de la formo *V-e*, kie *V* estas verba vortobazo, estas *en maniero rilata al aŭ karakterizata de la ago V-i*).

C. Surbaze de ĉi tiuj konstatoj la Akademio

1. rekomendas, ke al lernantoj de Esperanto oni ne prezentu la kontestatajn pasivecajn adjektivojn kiel ekzemplojn de regula vortfarado, sed kiel tradiciiĝintajn esceptojn al la kutimaj reguloj de vortfarado per la finaĵo *-a*;
2. esprimas sian subtenon al tiuj Esperantistoj, kiuj penas plene eviti tiujn kontestatajn pasivecajn adjektivojn, samtempe agnoskante ke la uzo de la pli enradikiĝintaj pasivecaj adjektivoj estas tolerebla ĝuste pro tio ke ili enradikiĝis en la efektivan lingvouzon;
3. tute malaprobas la uzon de formoj kiel *korektigi*, *komplikigi* kaj *vekigi* en la sencoj de *korekti*, *kompliki* kaj *veki*.

D. La Akademio kompilis la ĉi-suban liston de kontestebaj pasivecaj adjektivoj. La listo donas aldonajn informojn pri la unuopaj adjektivoj. Krome, ĉe la efektive kontestindaj adjektivoj ĝi mencias eblajn alternativajn esprimojn, kiujn oni povas uzi por eviti la koncernajn adjektivojn. La listo traktas ĉefe la pasivecajn signifojn de la koncernaj adjektivoj; sekve, se adjektivo estas menciita sen precizigo de la intencita signifo, ĉiam estas intencita ĝia pasiveca senco.

¹ alivorte el verba radikalo, do el verba radiko aŭ el kunmetaĵo de vorteroj kune kondukantaj kiel verba radiko

² Por simpligi la priskribon, ni ĝenerale uzas la esprimon *pasiveca adjektivo* kiam ni parolas pri pasivecaj uzoj de adjektivoj derivitaj de verba vortobazo. La samaj adjektivoj ankaŭ povas havi nepasivecajn uzojn, pri kiuj ĉi tiu decido tamen ne temas.

E. Aldonaj konsideroj kaj argumentoj, kiuj pravigas la ĉi-suprajn konstatojn kaj rekomendojn, troviĝas en la aparta dokumento *Aldonaj detaloj subtenantaj la Akademian decidon pri pasivecaj adjektivoj*.

abstrakt/a

Kelkaj vortaroj, ekzemple la Plena Vortaro, listigas *abstrakt/i* kiel bazan formon de *abstrakt/*. Sekve en tiuj vortaroj ŝajnas ke *abstrakt/a* ankaŭ estas pasiveca adjektivo al kiu povus aplikiĝi ĉi tiu Akademia decido. Tamen la oficiala radika karaktero de *abstrakt/* estas adjektiva, do nur la signifo *abstrakta* estas oficiala signifo de *abstrakt/*.³ Do la kutima uzo de *abstrakta* ne estu konestata. Oni tamen povus kontesti la kutiman signifon de *abstrakti*, ĉar ĝi ne regule deriveblas de la kutima kaj oficiala signifo de *abstrakta*. Oni povus uzi *abstraktumi* anstataŭ *abstrakti* por eviti tiun problemon.

bezona

Ĉi tiu vorto estis en la frua tempo de Esperanto kaj ĉe Zamenhof relative ofta, sed poste rapide maloftiĝis kaj estas ekde la dua mondmilito apenaŭ uzata. Taŭgaj alternativoj estas *bezonata* kaj *necesa*.

difekt/a

difekta estas unu el la plej maloftaj el la ĉi tie listigitaj pasivecaj adjektivoj. Pro tio ĝi ne estas pravigebla per la lingva tradicio, kaj la Akademio tute malrekomendas ĝin. Depende de la kunteksto, taŭgaj alternativoj povas esti *difektita*, *difektohava*, *mankohava*, *nefunkcianta* aŭ *neuzebla*.

dub/a

Taŭga alternativa esprimo estas *dubinda*.

fals/a

Aldone al tio, ke *falsa* estas unu el la pasivecaj adjektivoj plej forte enradikiĝintaj en la efektivan lingvouzon, la Akademio jam en la Baza Radikaro Oficiala de 1969 deklaris ĝin dukategoria radiko, kiu do havas du bazajn signifojn, unu agan kaj unu ecan, ne regule deriveblajn unu de la alia. La Akademio nun decidis ne malfari tiun decidon, sed nur pliprecizigi ĝin per oficiala difino de la radiko. La oficialigita eca signifo de *fals/* estas *malaŭtentika*, *falsita*, dum la fojfoje renkontataj signifoj *malĝusta*/*malvera* kaj *prezentanta la veron mensoge/erare* estis malrekomendataj.

fals/ havas do iom specialan statuson kiel oficiale dukategoria radiko. Se oni tamen volas uzi ĝin nur verbkaraktere, oni povas uzi *malaŭtentika* aŭ *falsita* por la oficialigita signifo de *falsa* kaj *malĝusta*, *malvera*, *mensoga* kaj *erariga* por la malrekomendataj signifoj de *falsa*.

ferm/a

ferma ŝajne ne aperis en Esperanto pro nacilingva influo, sed pro analogeco al *malferma* (kiu ja klarigeblas per nacilingva influo). Ĝi estas unu el la plej maloftaj el la ĉi tie listigitaj pasivecaj adjektivoj. Pro tio ĝi ne estas pravigebla per la lingva tradicio, kaj la Akademio tute malrekomendas ĝin. Plej ofte taŭgas kiel alternativo la participo *fermita*. Tamen fojfoje povas ĝeni, ke laŭ la kutima signifo de *-it-*, io nur povas esti fermita se ĝi antaŭe estis malfermita; ekzemple okuloj de hundiĝoj, kiuj ĝis nun neniam malfermis siajn okulojn, laŭ tiu logiko ne povas esti konsiderataj fermitaj. Ofte tiu signifero de *fermita* estas ignorata en la efektiva uzo, kaj *fermita* estas simple uzata por priskribi staton sen konsidero pri antaŭa statŝanĝo. Sed kiam tiu signifero de *fermita* efektive povas kaŭzi

3 La decido pri la oficiala radika karaktero de *abstrakt/* estas ĵus farita konforme al la jamaj adjektivaj oficialaj tradukoj de *abstrakt/* en la 1-a Oficiala Aldono kaj konforme kun la prezento de *abstrakt/* en la Plena Ilustrita Vortaro de 1973, 2002 kaj 2005.

miskomprenon, eblas uzi la alternativon *nemalfermita*.

fiks/a

Multaj uzoj de *fiksa* kaj *fikse* estas en esprimoj kiel *fiksa rigardo* kaj *fikse rigardi*. Kelkaj naciaj lingvoj havas similsignifajn esprimojn, kie en la loko de *fiksa* aperas vorto kun signifo simila al *fiksita* (ekzemple la franca “*regard fixe*”). Pro tio oni povus emi interpreti tiujn uzojn de *fiksa* kiel pasivecajn uzojn. Tamen ankaŭ eblas interpreti *rigardi ion fikse* kiel *rigardi fiksinte sian rigardon sur io*, kio estas ne-pasiveca interpreto de tiu esprimo. En la esprimo *fiksa rigardo* do eblas interpreti *fiksa* kiel pliprecizigon de la ĝenerala senco *rilata al aŭ karakterizata de la ago fiksi*. Tiu uzo de *fiksa* do estas tute bona kaj neniel evitinda.

Tamen fojfoje *fiksa* aperas ankaŭ en vere pasiveca uzo, ekzemple en esprimoj kiel *fiksa prezo* aŭ *fiksa ideo*. Taŭgaj alternativaj esprimoj por tiaj uzoj estas *fiksita* kaj *firma*.

fuŝ/a

Depende de la kunteksto, taŭgaj alternativoj estas *malbona*, *aĉa* aŭ *fuŝita*.

hered/a

Kelkaj uzoj de *hereda* estas tute ne pasivecaj kaj tute ne kritikindaj, ekzemple *hereda imposto*. Ĉe kelkaj pasivecaj uzoj de *hereda*, la intencita signifo ne estas simple *heredita* aŭ *heredata*, sed *havanta kiel karakterizan econ ke ĝi kutime estas heredata*, ekzemple *hereda malsano* aŭ *hereda bieno*; ĉi tiuj uzoj estas klarigeblaj kiel pliprecizigoj de la ĝenerala signifo *rilata al aŭ karakterizita de la ago heredi*, kaj sekve estas tute akceptindaj. Sed kiam la intencita signifo estas *heredita* aŭ *heredata*, oni ne uzu *hereda*.

implic/a

implica estas unu el la plej maloftaj el la ĉi tie listigitaj pasivecaj adjektivoj. Pro tio ĝi ne estas pravigebla per la lingva tradicio, kaj la Akademio tute malrekomendas ĝin. Taŭga alternativo estas *implicita*. La vorto *implice* en frazoj kiel “La deklaro implice agnoskis la rolon de Esperanto kiel identigilo.” tamen estas klarigebla en ne-pasiveca maniero kaj ne bezonas esti anstataŭigita de *implicite*.

kaŝ/a

Multe pli ofta ol la adjektivo *kaŝa* estas la adverbo *kaŝe*. Ĝi kutime havas signifon samtempe proksiman al *kaŝante sin* kaj al *kaŝite/nevideble/nerimarkeble*. Tiu uzado de *kaŝe* estas pravigebla kaj ne estu kontestata. Inter la uzoj de *kaŝa* simile troveblas kelkaj uzoj nekontestindaj: Temas unuflanke pri uzoj kun senco simila al *sin kaŝanta*, ekzemple “la regantoj estas mem regataj de kaŝaj fortoj”, kaj aliflanke pri uzoj kiuj priskribas agon, kies subkomprenata aganto mem kaŝas sin aŭ ion, ekzemple “kaŝaj renkontiĝoj” kaj “kaŝaj manieroj agi”. Tamen kelkaj uzoj de *kaŝa* estas pasivecaj en pli kontestinda maniero, ekzemple “okazis skandalo pri la kontraŭleĝaj kaŝaj kasoj de la partiestro”. Taŭga alternativo por tiaj okazoj estas *kaŝita*.

komplik/a

Depende de la kunteksto, taŭgaj alternativaj esprimoj estas *malsimpla*, *malfacila* aŭ *komplikita*.

konfuz/a

konfuz/ estas verba radiko kaj havas tri klare distingeblajn signifojn:

1. malordigi/malklarigi (*konfuzi pensojn, eldirojn aŭ ideojn*)
2. kaŭzi malklarecon en la menso de iu (*konfuzi personon*)
3. ne kapabli distingi (*konfuzi du aferojn*)

konfuza havas en la efektiva lingvouzo du klare distingeblajn signifojn:

1. kaŭzanta malklarecon en la menso de iu (*konfuzaj ideoj, eldiroj*)
2. havanta malklarecon en sia menso (*konfuza persono*)

La unua senco de *konfuza* estas bone pravigebla surbaze de la dua senco de *konfuzi*, sed la dua senco de *konfuza* nur klarigeblas en pasiveca maniero kaj sekve estas kontestinda. Taŭga alternativo estas *konfuzita*.

korekt/a

La kutiman signifon de *korekta* plej bone trafas la alternativoj *senerara* kaj *laŭregula*. Tamen ankaŭ la iomete alisignifa vorto *ĝusta* tre ofte taŭgas kiel alternativo al *korekta*.

korupt/a

Tradicie Esperantaj vortaroj listigas *korupt/* kiel verban radikon, kaj tiam la kutima uzado de *korupta* ŝajnas pasiveca. Sed post zorga studado de la efektiva lingvouzo de *korupt/* fare de bona aŭtoroj, la Akademio konstatis ke substantiva karaktero pli bone klarigas ĝian kutiman funkciadon, kaj sekve oficiale deklaris ĝin substantiv-karaktera, samtempe provizante ĝin per oficiala traduko. La kutima uzo de *korupta* do ne estas kontestinda.

mal/ferm/a

Plej ofte taŭgas kiel alternativo la participo *malfermita*. Tamen ĝi fojfoje povas kaŭzi similan problemon kiel tiun menciitan pri *fermita* ĉi-supre sub **ferm/a**. Tiam eblas uzi *nefermita*.

miks/a

Kvankam *miksa* en uzoj kiel *miksa raso* havas signifon similan al *miksita*, ĝi tamen estas ankaŭ klarigebla kiel pliprecizigo de la ĝenerala signifo *karakterizata de miksado*, kaj do ne estas vere kontestinda. Simile statas pri uzoj de *miks/* en kunmetaĵoj kiel *miksrasa* aŭ *miskolora*.

parol/a

Kvankam *parola* en uzoj kiel *parola lingvo* havas signifon similan al *parolata*, ĝi tamen estas tute bone klarigebla kiel pliprecizigo de la ĝenerala signifo *karakterizata de parolado*, kaj do ne estu kontestata.

ripet/a

Kvankam *ripeta* en uzoj kiel *ripeta kaj teda tasko* havas signifon similan al *ripetata* aŭ *ripetita*, ĝi tamen estas ankaŭ klarigebla kiel pliprecizigo de la ĝenerala signifo *karakterizata de ripetado*, kaj do ne estas vere kontestinda.

skrib/a

Kvankam *skriba* en uzoj kiel *skriba atesto* kaj *skriba lingvo* havas signifon similan al *skribita* aŭ *skribata*, ĝi tamen estas tute bone klarigebla kiel pliprecizigo de la ĝenerala signifo *karakterizata de skribado*, kaj do ne estu kontestata.

Oni notu ke eĉ kiam *skriba* alprenas signifon iom similan al *skribita* aŭ *skribata*, ekzistas klara signifodiferenco inter *skriba* kaj *skribita* aŭ *skribata*: *Skriba atesto* estas atesto donita en skriba formo, dum *skribita atesto* povas ankaŭ esti atesto origine donita en parola formo sed poste ial skribita de alia persono. *Skriba lingvo* estas lingvo kun skriba tradicio aŭ pli preciza la skribe uzata variaĵo de tia lingvo; *skribita lingvo* (aŭ *skribata lingvo*) ankaŭ povas esti lingvo uzata nur parole sed skribe registrita (aŭ registrata) de lingvistoj de ekster la lingva komunumo. En esprimo kiel *skriba formo de nomo*, *skriba* tute ne estas anstataŭigebla per *skribita* aŭ *skribata*; oni ja ne skribas la formon sed la nomon. Ĉiuj ĉi uzoj de *skriba* tamen povas senprobleme esti klarigataj kiel pliprecizigoj de la ĝenerala signifo *karakterizata de skribado*.

specif/a

En la 9-a Oficiala Aldono, la Akademio oficialigis *specifi* kun la signifo *Nome esprimi, detale difini, precize mencii*, kaj aparte oficialigis *specifa* kun la signifo *Havanta ecojn karakterizajn aŭ unikajn por unu individuo aŭ unu klaso; propra al individuo aŭ klaso*⁴. Kvankam ĉi tiu signifo de *specifa* nur iom peze interpreteblas kiel pliprecizigo de *rilata al aŭ karakterizata de la ago specifi*, la Akademio plu opinias ĉi tiun signifon uzinda.

Tamen multaj reale renkonteblaj uzoj de *specifa* ne havas ĉi tiun signifon, sed signifojn pli pasivecajn: Relative ofte ĝi havas signifon similan al *aparta* (precipe en adverba uzo⁵, sed ankaŭ en adjektiva uzo⁶). Malpli ofte *specifa* aŭ *iu specifa* estas uzata en duondifina funkcio antaŭ substantivo (simile kiel la duondifinaj uzoj de *certa* antaŭ substantivo, do por indiki ke la parolanto pensas pri difinita objekto, kvankam li ne priskribas ĝin sufiĉe detale por difini ĝin por la aŭskultanto). Ankoraŭ iom malpli ofte *specifa* havas signifon similan al *specifita* aŭ *difinita*.

Por ĉi tiuj pasivecaj signifoj de *specifa* eblas uzi alternativojn kiel *aparta*, *specifita*, *difinita* aŭ *certa*.

suspekt/a

Ĉi tiu estas la sola pasiveca adjektivo trovebla en la Fundamento de Esperanto. Tamen ĝi neniam estis ofta vorto, kaj nuntempe eĉ estas malpli ofta ol en la frua Esperanto. Anstataŭe oni uzadas la pli regulan formon *suspektinda*, kiu estas taŭga alternativo.

vek/a

Maldormi estas taŭga esprimo uzebla anstataŭ *esti veka*. Ĝenerale uzeblaj anstataŭigoj por *veka* estas krome *maldormanta* kaj *maldorma*, kun nur nuanca signifodiferenco. En kelkaj kuntekstoj ankaŭ taŭgas la alternativoj *vekiĝinta* kaj *vekita*.

4 Ekzemplaj uzoj estas “la specifa stilo de pentristo” (la stilo karakterizas ĝuste tiun pentriston) kaj “la specifaj formoj de unu klaso de bestoj” (nur tiu klaso havas tiujn formojn).

5 ekz-e en “ankoraŭ ne malarmis sin respublikismaj organizaĵoj — specife la t.n. Irlanda Respublika Armeo (IRA)”

6 ekz-e en “Ĝis nun en Esperanto haveblis malmulto pri budhismo, kaj eble nenio verkita de budhisto, sentendenca, kaj ne propagandanta specifan skolon”